# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

**http://satesperanto.free.fr/ *** retadreso: satesperanto@free.fr**


# Sukcese okazis nia Zagreba Kongreso




Dum la vizito de la Kroata Parlamento nia kamaradino Carmela manpremas deputiton kaj esperantiston Stjepan Radiĉ, kiu estis mortigita de ekstremdekstrulo en Jugoslavia Parlamento en la jaro 1928.

Fotis: Viola


Septembro 2005 76-a jaro, n-ro 9 (1203)
MENSUEL / MONATA Prezo: 5 €
ISSN 1163.0442


**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

# El la redaktejo...



*Karaj,*
*jen denove komenciĝas nova laborjaro post la kongreso kaj someraj ferioj.*
*Kvankam malgranda laŭ nombro de partoprenantoj, nia kongreso en Zagrebo estis tre agrabla kaj tre sukcesa. Ni multe laboris kaj pri la rezultoj vi povas legi jam en tiu ĉi numero de Sennaciulo.*
*Fine, kiel suplementon, vi trovas la ĉi-jaran "Sennaciecan Revuon" kiu certe alportos al vi multe da plezuro kaj agrablo.*
*Ni nun ĉion faras por revivigi nian Asocion kaj invitas ĉiujn membrojn aktivi en batalo por la paco (vidu ekzemplon de ge-kdoj Weiss), por pli bona kaj pli sociala mondo. Kiam la SAT-anoj aktivas, SAT-aktivas.*
*Kamaradece,*
*via Redaktoro.*


Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://satesperanto.free.fr
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
❐
Imprimé par : EDRB, Avenue Mozart, FR-75016 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.


PACAGADO

## VIZITO AL KROATA CENTRO POR SENMINIGO



La 7-an de julio, komuna delegacio de SAT kaj KEL (Kroata Esperanto-Ligo) vizitis la sidejon de HCR (Kroata Centro por senminigo) en urbo Sisak..



La skipestro kaj nia gvidantino montras al ni sur la mapo kia estas aktuala situacio sur tiu ĉi tereno. Malantaŭ ni estas ankoraŭ ĉio minita.




Post la informoj pri agado de HCR ni vizitis la terenon proksime de urbo Petrinja kiu estis okupita. Ĉie troviĝas atentigoj pri la minoj.



Kuraĝaj senminigistoj laboras ĉiutage dum kvin horoj, esplorante centimetron post centimetro, riskante sian vivon en ĉiu momento. Ili faras tion kontraŭ honte malalta salajro.



La enirejo de la laborterenon estas tute proksime de la strato kaj domoj. Tie daŭre atendas ambulanco.



Ĉie troviĝas atentigoj kun la vorto "mine" (minoj).



Sur certaj terenoj eblas uzi maŝinojn kiuj estas direktataj je distanco.

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

## DEKLARACIO

La 78-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninta en Zagrebo de la 2-a ĝis la 9-a de julio 2005 :
* **Kondamnas** ĉiujn atencojn kiel tiujn, ĵus okazintajn en Londono kaj ĉiujn militojn.

* **Postulas** dialogon kaj intertraktadon kiel rimedon al solvo de konfliktoj kaj aplikadon de la Ĝeneva konvencio al ĉiuj kaptitoj, interalie de Guantanamo-Golfo.

* **Ree postulas** ke la landoj, kiuj ne ankoraŭ subskribis la Konvencion de Otavo, pri la "malpermeso de la uzado, produktado kaj stokado de kontraŭpersonaj minoj kaj pri la detruo de kontraŭpersonaj minoj", nepre subskribu kaj apliku ĝin.

* **Postulas** inkluzivi en la kampon de apliko de la Konvencio de Otavo ĉiujn armilojn kiuj eksplodas, samkiel kontraŭpersonaj minoj, t.e. pro la ĉeesto, proksimeco aŭ kontakto de eĉ nur unu homo.

* **Postulas** mondan solvon de la problemo pri rifuĝintoj kaj malaperigon de provizoraj restadejoj por ili.

* **Alvokas** la loĝantaron de ĉiuj landoj ne subskribintaj la Kiotan konvencion pri mediprotektado, premi sian registaron tuj subskribi ĝin.

* **Apogas** la mondajn, kontinentajn kaj lokajn sociajn forumojn kiuj kontraŭstaras la liberalan kapitalisman tutmondiĝon.

* **Kontraŭstaras** sklavecon kaj uzadon de virinoj kaj infanoj kiel varojn.

* **Defendas** la homajn rajtojn por ĉiuj homoj, inkluzive de malliberigitaj esperantistoj.

## GVIDREZOLUCIO

La 78-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninta en Zagrebo de la 2-a ĝis la 9-a de jun- io 2005 :

* **Instigas** siajn membrojn agadi en siaj medioj por disvastigi la ideojn de SAT kaj varbi novajn membrojn.

* **Petas** ĉiun anon starigi kaj partopreni debatojn kaj diskutojn en la kongresoj, Sennaciulo, retdiskutejoj, ktp.

* **Instigas** la membrojn aĉet(ig)i kaj legi la eldonaĵojn de SAT cele akiri rimedojn por plu eldoni.

* **Alvokas** ĉiujn anojn aktivi por la laikeco en sia respektiva lando.

* **Instigas** siajn membrojn partopreni en la diversaj sociaj forumoj.

* **Forte apogas** iniciatojn de SAT-membroj en diversaj kampoj respondantaj al la celoj de la Asocio por ke poste ili iĝu iniciatoj de la tuta Asocio.

* **La Kongreso de SAT renovigas** sian fidon al k-do Kreŝimir Barkoviĉ en la funkcioj de sekretario kaj redaktoro.